

# Eventoj

Redakcia adreso:  
Budapest, pk. 87.  
H-1675, Hungario  
Telefono kaj telefakso:  
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado

majo (1) - '92

## Kiel trovi monon por esperantaj celoj?

Informaj pripensoj naskitaj dum la preparado de la SAT-Amikara Kongreso sur loko Nazzelles-Négron (jaro 1991), kaj per la konsiloj de s-ro Pierre Croix - urbokonsilanto.

Pluraj personoj petis informojn rilate la kolektadon de monsubtenantoj okaze de la SAT-Amikara Kongreso en Ambuazo. La afero estas ampleksa, kaj detala priskribo povas utili al multaj aktivuloj. Pro tio, aperas la jenaj linioj.

### Necesaj klarigoj.

Oni nepre distingu inter diversaj formoj de subteno fare de firmaoj.

- La **mecenateco** donas monon (avantaĝojn) sen konsidero al ia tipo de repago. Mecenato subtenas artiston aŭ asocion pro intima simpatio, aŭ pro konvinko pri la valoro de la petano.

- La **reklamado** estas je alia ekstremo de financado. "Vi donas al mi X frankojn, kaj mi ofertas al vi Y kvadratajn centimetrojn da reklamsurfaco en nia revuo aŭ sur afiŝo." La kontrakto estas strikte difinita kaj sensurpriza. Tamen, por sukcesi, la petanto ne devas tro peti, aŭ devas pruvi la grandskalan disvastigadon de la revuo aŭ afiŝo.

- La **monsubtenado** aspektas pli taŭge por niaj klopodoj (Franclingve: le sponsoring!). Male al la mecenato, la monsubtenanto petas kompencon sub la formo de oficialaj dankoj, varmaj laŭdoj k.t.p... Tamen, la kontrakto pri tio ne estas tiel preciza kiel tiu pri simpla reklamado.



### Preparado.

Oni devas unue elekti inter tiuj 3 tipoj de monpetado. La reklamado valoras por **kutima afero** (revuo, kalendaro de fajrobrigado k.t.p.), kaj la mecenato ekzistas, sed estas tre malmultaj. Do restas la 3-a tipo: monsubtenado - procedo ege laŭmoda (verŝajne tro...). Tiu laboro estas peniga, kaj povas estiĝi nur okaze

de evento.

Direktisto de firmao neniam donos monon sen iom da garantio de seriozecon. Pro tio, estas preskaŭ necese **prepari dosieron**, dokumentaron, por prezenti la projekton. La seriozecon de la dosiero kvazaŭ pruvas la seriozecon de la generala afero.

Ne provu konvinki pri la pravenco de la Esperantistoj: tio estus tempoperdo kaj eĉ eraro. Oni havu la celon pruvi la gravecon, la **amplekson de la planitaj aranĝoj**. Neniam supozu, ke firmao donas monon pro simpatio al nia idealo. Estus plia eraro.

### La dosiero.

La dosiero povas esti preparata laŭ ĉies gusto. Tamen, kelkaj reguloj povas esti utile sekvetaj. La dosiero entenu:

- enkondukon fare de gravulo kiel verkisto, urbestro, famulo. (Por la okazo, se tio ne eblas, letereto de la asocia prezidanto estas kontentiga solvo);

- la programon de la antaŭviditaj aranĝoj, unue resume kaj poste iom detale. (Oni memoru, ke verŝajne neniu legos la dosieron entute; do, ne estas grave, ke la tekstoj estas interesaj aŭ ne! Tamen, oni priatentu la prezentadon);

- antaŭviditan buĝeton rondciferan (Vi tute rajtas fantazii, ĉar tio ne estas promeso. Tamen, oni faru la buĝeton iom serioze).

Se vi indikas malgrandajn sumojn, tio pruvas la malvastecon de via afero. Plie: "Kial vi petas monon, se vi bezonas tiom malmulte?" Vi facile trovos solvojn, por grandigi la ciferojn.

Se vi indikas tro grandajn sumojn, tio povas esti timiga por multaj entreprenistoj: "Ĉu ili sukcesos finance? Ĉu ili ne estas friponoj?"

Pri niaj agadoj, oni nuntempe ne prezentu buĝeton superan al 100.000 Francaj frankoj. Por nia kongreso la antaŭvidita fantazia buĝeto estis taksita je 60.000 Francaj frankoj.

Plurloke kaj skribe oni devas indiki la kompensojn por la monsubtenantoj. Ili donos nur kun garantio pri granda reklamado. Okaze de nia Ambuaza Kongreso, ni petis po 2.000 Francajn frankojn. La kompensoj estis jenaj:

- ĉe la enirejo montrobendo, sur kiu estas surskribitaj la nomoj de la subtenantoj (simbola afero);

- anonco sur la kongresafiŝoj (ĉu efika?);

- dankoj sur la lasta paĝo de nia libro "Ambuaza Statuaro" (la ĉefa reklamejo).

La kontrakto estas subskribenda kaj de la firmaa direktisto kaj de la asocia prezidanto.

Resume, la dosiero havas la celon pruvi la

seriozecon de la petanto. Pro tio, bela prezento estas la plej bona garantio. Ĝi devas enhavi dekon da paĝoj.

### La klopodoj.

La klopodoj estas longaj kaj ofte senkuraĝigaj.

La plej bona maniero estas, ke oni aranĝu rendezuon kun la direktisto de la koncerna entrepreno. Oni ne perdu tempon kun subĉefoj, kiuj ne tenas la monujon. La sekretariino demandas pri la kialo de via peto. "Mi preparas grandan eventon (...), kaj bezonas ricevi diversajn apogojn. Pro tio, mi deziras prezenti nian dosieron al s-ro X". Vi estu aŭdaca kaj ne timu la kravatojn.

Dum la intervidiĝo oni devas esti konvinke-



ma, kaj inspiri fidon. La direktisto rapide foliumos vian dosieron, kaj faros trafajn demandojn, kiujn vi devas precize respondi; ekzemple: Kiom da monsubtenantoj vi deziras trovi? - Kion vi faros, se vi ne trovos la atenditan sumon? - Kion vi faros, se vi ne trovos la atenditan sumon? - Kion vi proponas al ni, se ni donas 10.000 frankojn?

La 2-a solvo estas, ke vi poste sendu la dosieron akompanatan de skriba peto ĝin studi. La dosiero riskas miksiĝi kun multaj aliaj paperaĉoj, kaj pro tio la metodo ŝajnas malpli efika. Tamen, multaj direktistoj malakceptas rendezuon san antaŭe vidi la dosieron.

La plej rapida metodo estas, ke oni sendu la dokumentaron, kaj poste marĉandu telefone. Tamen, la rezultoj iĝas malpli sukcesaj. Tio eblas fine de la klopoda periodo, kaj eĉ tiam estas eble vendi rabate la partoprenon.

Daŭrigo sur la p. 2.

## Esperanto defendata

Kion fari por...

### Rebati en la gazetaro

*Pli mapli regule aperas artikoloj, kiuj kritikis esperanton aŭ misinformas pri ĝi. Kion ni faru?*

I. Tuj reagi.

II. Senprokraste diskonigi tiun artikolon, fotokopie aŭ telefone al seriozaj, kompetentaj samideanoj, ke ankaŭ ili reagu.

Nepras klare scii: la titolon de la revuo, aperdaton de la artikolo, kompletan adresaron de la gazeto.

### Kiel reagi?

1. Ni bone konsci, ke ĝenerale homoj negative skribas pri esperanto ĉar ili ne estas bone informitaj; pri tiu bedaŭrinda situacio kulpas grandparte esperantistoj mem.

2. Nepre ni evitu polemikon kaj akran esprimmanieron; tio ĉiam malbonege impresas kaj ofte malebligas postajn kontaktojn.

3. Pli ol rebati ni atentigu pri eraroj, zorgante pri afabla etoso. Ekzemple: *Pri tiu ĉi punkto oni erare aŭ mise informis vin. Fakte la realo estas alia... Kiel vi povas konstati ankaŭ laŭ la aldonita dokumento...*

4. Laŭeble ni aldonu fotokopion de dokumentoj, kiuj plifortigas niajn argumentojn, kaj ni substreku la plej gravajn frazojn.

5. Preferinde ni respondu per precizaj argumentoj, plej eble freŝdataj kaj ĝisdatigitaj, bazitaj sur seriozaj referencoj:

- instituto, universitato estas atesto pri kredindeco;

- titolita persono, eminentulo: oni kredas pli facile Prof. D-ron B. ol s-ron Z. eĉ se temas pri la samaj ideoj.

6. Anstataŭ rebati ĉiujn punktojn, ni elektu unu aŭ du, pri kiu(j) ni havas fortikajn, kontroleblajn argumentojn. Kiu deziras refuti ĉiujn punktojn, povas fari tion per pluraj leteroj, sendante ilin nome de aliaj personoj, kompreneble kun ilia konsento (aŭ donante al ili la sendotan tekston); tiam nepras diverŝigi la stilon, dokumentojn, prezenton.

7. Ĝenerale mallonga letero estas pli facile publikigita: ideala longeco estas 20 linioj; trafega fakto pli valoras ol dupaĝa babilado.

8. Se la aŭtoro de la rebatata artikolo ne estas ĵurnalisto, ni aldonu kopion de nia letero, petante la ĉefredaktoron plusendi ĝin al li, kiun tiamaniere ni povos kontakti kaj kun kiu eblas eventuale ekdialogi.

9. Ni skribu legeble, prefere la letero estu tajpita, kaj klare ni menciu niajn nomon kaj kompletan adreson.

10. Finfine ni komprenu, ke ĵurnalo ne povas aperigi la dekojn da leteroj, kiujn ĝi ricevas ĉiutage; nur la plej trafaj, la plej interesaj havas ŝancon vekti intereson kaj esti publikigitaj. Tamen, ju pli multaj leteroj pritraktas temon, des pli malfacile ĵurnalo povas neglekti tiun temon.

11. Se nia letero estas publikigita, ni nepre danku! Temas pri elementa edukiteco kaj estas okazo por sendi plian argumenton.

Ĉu malfrua reago utilas? Jes! Eĉ post semajnoj aŭ monatoj, reagoj ĉiam bonvenas kaj utilas, sed tiam ni komencu nian leteron alimaniere. Ekzemple:

a) *Kolego mia ĵus sendis al mi vian revuon, en kiu vi (aŭ A.N.) skribas pri...*

b) *De pluraj tagoj mi intencas skribi al vi pri...*

c) *Mi kaptas feritagon por...*

d) *Lastatempe aperis en via ĵurnalo artikolo pri...*

**Atentu! Se ni nur supraĵe konas la rebatotan temon, ni turnu nin al kompetentulo kaj bone informiĝu antaŭ skribi.**

**Kelfoje preferindas silenti ol misargumenti!**

*Germain Pirlof, Belgio  
(laŭ Inf-fluo, majo/1990)*



Kiel trovi monon... daŭrigo de p. 1.

### La sukcesoj.

La sukcesoj venos iom post iom. Oni tamen estu prudenta.

Estus bone havi diversecon en la listo de la monsubtenantoj. Se estus 4 aŭ 5 bankoj, la efiko de reklamado estus nula.

Oni petu multe da mono, sed ne tro. Dum la preparo al nia Kongreso, ni petis 2.000 frankojn de ĉiuj. Tiu sumo estas tro alta por metisto kaj malalta por bankestro. Bona metodo estas, ke oni proponu deversajn tarifojn kaj diversajn kompensojn. Sed tiam temas pri reklamado, kaj ne plu pri monsubtenado.

Plie, anonco de viandisto aŭ de legomvendisto estas ebla en la fajrobrigada kalendaro, se ĝi tamen ne multe kongruas kun la alta valoro de nia idealo.

La sukcesoj estos multe pli facilaj, se anstataŭ monon oni petas materialajn kompensojn. La gajnoj povas esti multe pli interesaj. Tiel la konsilantaro de urbo Nazelles-Négron konsentis senpagon por la Kongresejo (tio estas ŝparo pri 2.500 frankoj) kontraŭ anonco. Estas same pri la floristo, kiu senpage instalas kreskaĵojn. Oni nepre faru la liston de la materialaj bezonoj (sonapartoj, ŝarĝaŭto, floroj, k.t.p.), kaj tiam oni serĉu...

### Atentigoj.

La monsubtenantoj deziras fari propagandon okaze de publikaj eventoj, kaj tute ne por fermita kongreso.

Se vi ne povas plenumi la promesojn pri reklamado, vi estu ĉiam preta repagi ĉiujn sumojn.

Konklude, vi neniam malesperu; la subtenoj venos tien, kie vi ne atendas ilin!

Ni povas pruntedoni nian dosieron al tiuj, kiuj deziras. Kurago!

laŭ SAT-Amikaro

## Teorio

Organizi kongreson

### Movado aŭ/kaj entrepreno?

Ĉu eblas samtempe ambaŭ?

La ĉijara Universala Kongreso de Esperanto (de UEA) estis planata okazi en Prago. Sed ĝi okazos en Vieno. Eble ne ĉiuj scias kial. Onidire pro tio, ke la lastatempaj politikaj-ekonomiaj ŝanĝoj en Ĉeĥoslovakio kvankam donas grandajn esperojn en la estonto, sed ĉijare ne estis havebla la *necesa* financa garantio, ĉu certe la kurzoj estos antaŭvideblaj, ĉu privatigo de entreprenoj rezultos molan grundon por garantio de kontraktoj, ktp. Pli detalaj (ne nepre pli longaj) analizoj estas bonvenaj.

Estas ankaŭ certe, ke temas pri "batalo" de du skoloj:

1. **organizi kongreson profesie**, t.e. ĉiam kun la samaj homoj, kiuj la pasintjarajn spertojn povas utiligi, krome ili okupiĝas pri ĝi dum labortempo dum la tuta jaro (krom aliaj taskoj). Tio donas avantaĝojn, ke ne surloka volontulo faras la esencajn decidojn, nur eventuale helpas en la loka realigado, traduko, pordisto en loka asista komitato, ktp.

2. **organizi kongreson fare de loka invitanta instanco, kutime en la landa esperanto-asocio** fondita Loka Kongresa Komitato, kiuj kvankam eble la unuan fojon organizas kongreson, sed kutime havas ian organizan, movadan sperton kaj konas la lokajn kondiĉojn, ĉe kiuj instancoj, kaj kiel argumenti por ricevi ĝustan subtenon.

Ambaŭ teorioj estas pravigeblaj certagrade. Kombini la du ne eblas, ĉar en la ĉefaj decidoj (trajto, amaseco, prez-nivelo averaĝa kaj minimuma-maksimuma, mendi grandan salomon laŭ kiu prezo kaj kondiĉo) devas esti en ies mano kaj respondeco. Kaj se la decidoj rezultas profiton aŭ malprofiton, ankaŭ ties sekvojn iu rikoltas.

Ŝajnas, ke ĉifoje venkis la unua, profesieca organizo, nome la kongreso estas organizata de la Centra Oficejo de UEA el Rotterdamo.

Post tioma meditado staru ĉi tie propono:

La Universala Kongreso estu organizata de profesia teamo, por tiu celo funkcia vojaĝoficejo, kaj neniel movada instanco, nek estraro de ajna asocio. Personaj rilatoj, povas esti, eĉ estas dezirinda, sed nek ajna asocio (kaj ties estraro) estu ĉefo de la vojaĝoficejo, nek la oficejo estu ĉefo de la movada asocio. Nun tiuj aferoj tute ne estas disigataj. La entrepreno funkcii entreprene kaj la asocio kiel sindikato klopodu defendi la intereson de siaj membroj, per forto de publikeco, mendo de multaj lokoj por ricevi rabaton. Tio ankaŭ estus la intereso de la entrepreno. Kaj ĝi ankaŭ timus havi malbonan rilaton kun la asocio, ĉar alie la asocio povas alvoki al bojkoto, ktp.

Sándor HIDEG, Hungario

## Faka aplikado

### La programo Winword de Microsoft lernis la Esperanto-supersignojn

La esperantistoj ja kiel multaj aliaj anoj de lingvoj kun specialaj signoj baraktis daŭre kun la problemo de la supersignoj. Por la programo Winword de Microsoft nun haveblas taŭga solvo, kvankam la ĉapelitaj literoj ne aspektos perfektaj: En grafika programo mi desegnis la literojn kaj ilin transprenis la teksto-dataro de Winword. Poste mi ilin storis kiel tekst-konstru-elementoj sub specialaj kodoj. Ja kaj jen mi nun disponas pri la ĉapelitaj literoj. La plej videbla problemo: La spaco post la litero kaj la fakto, ke ili ĉiam aspektas grasaj. Tamen pli bone ol nenio. Kaj ili tutsame aperas sur la ekrano kiel sur la papero. Kiu deziras ricevi la literojn devas posedi la programojn Windows, Winword, laseran printilon kaj komputilon kun sufiĉe granda memorkabalo (almenaŭ 2 megabajtoj). La fakto, ke nun Winword kapablas skribi esperant-lingvajn tekstojn, estas grava progreso. Finiĝis do la epoko de Word-Perfect, kiu ja estas komplika programo kaj apenaŭ havas la eblojn de Winword.

Dietrich M. Weidmann

(el Junaj (Svisaj) Esperantistoj Informas, Nr-o 1/91.)

Tamen ni menciuj, ke pluraj teksto-prilaboraj programoj jam solvis tiun problemon (interalie Word-Perfect, Juvelo, ktp.) Cetere Word-Perfect posedas perfektajn esperantajn literojn sur la ekrano, kaj kapablas presi *ajnan* esperanto-literon, eĉ ne nur la dikajn ankaŭ per pingla printilo. (Nun ni ne parolu pri Ventura, en kiu la problemo plene estas solvita). Programojn por projekti plej diversajn literfontojn por printiloj evoluigis la estfirmao Tramontana (direktoro: Gábor Deák, prezidanto de HEJ).

L.S.



## Kontakto serĉata

J.V. s.o.f. Plzen (Jiri Vomáčka, privata komerca firmao): ul. Koterovská 30, CS-301 41 Plzen, Ĉeĥoslovakio.

Komercado per libroj, ankaŭ esperantlingvaj, por cetera varo, informa agado, propagando, informa servo, maklereco, ekonomiaj kontaktadservoj, reprezentado en Ĉeĥoslovakio de eksterlandaj esperanto-parolantaj firmaoj.

## Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

La fakgrupo laŭstatute celas al la disvastigo de esperanto en la kampoj de komerco, ekonomio kaj ekonomia scienco. Ĝi provas atingi tiun celon per jenaj agadoj:

- eldoni ĝisdatigitajn fakajn terminarojn;
- ebligi renkontiĝojn de membroj, organizi studseminariojn;
- helpi membrojn, kiuj uzas esperanton en siaj komercaj rilatoj, ekzemple faciligante reciprokajn interŝanĝojn de informoj;
- eldoni fakan revuon aŭ bultenon kaj/aŭ subteni la eldonadon de tiaj revuoj aŭ bultenoj; verki fakaj artikoloj en la esperanta gazetaraj;
- instigi al aperigo de komercaj anoncoj en la esperanta gazetaraj

En 1991 IKEF ligis ĉ.100 personojn kun profesiaj rilatoj al komerco kaj ekonomio. La IKEF-bulteno *La Merkato* regule aperigas identec-ŝildojn de la membroj, per kiuj oni povas trovi komercajn partnerojn aŭ transdoni interesajn informojn. Meze de 1989 tiuj identec-ŝildoj estis unuafoje grupigitaj en bruŝuro. Aperis proveldono de Komerca Terminaro, kaj daŭre aperas Ekonomia Bulteno pri Usono. Pliaj informoj ĉe:

Roland Rotsaert

Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio

## Paradigma agado per la internacia lingvo

Kiel difini esperanton ekologie?

La estonteco estos kiel la mezepoko: ekologia. Jes, krom universala paco kaj sociala justeco la integra biosfero estas kolono de vivinda venonta tempo. Kaj tiu lasta fakte intertempe fariĝis la bazo de la du unuaj.


Integra biosfero postulas biologian kompetenton de la homo. Sed ekologio kiel biologia kompetento ne signifas multon escepte, se oni ĝin aplikas. Nenia dubo pri tio: Ekologio estas kaj interfaka scienco koncerne la naturmastrumon, de kiu homo estas parto aŭ partnero, kaj penso-agado-principaro de vivokonsciaj homoj, devenigita de tiu scienco. Kaj internacia lingvo taŭgas por la vivo nur, se oni utiligas, vivas ĝin adekvate al la ekologiaj sciencoj.

La du bazaj principoj de la ekologio estas limigo kaj prevento, ĉe kio la unua jam estas ĉefa antaŭkondiĉo kaj sekvo de la dua. Esperanto do ne signifas multon, escepte, se oni dekomence aplikas ĝin laŭ tiuj ĉi, ankaŭ siaj trajtoj de limigo kaj prevento. Internacia lingvo estas ekologia, ĉar ĝi dekomence aŭ imanente limigas lingvon al la lingvaj esencaĵoj cele interkomunikadon kaj interkompreniĝon. Kaj aldone ĝi estas ekologia, ĉar ĝi dekomence aŭ imanente prventas troigon de naciaj kaj kulturaj egoismoj. Naturmalŝparemo kaj kulturimperismo estas malimmanentaj al esperanto.

Oni povas kompari tiun ĉi faktaron kun la t.n. regiona anestezo. tiu estas tipo de anestezo, en kiu per aplikado de lokaj anesteziiloj kaj apartaj materialoj-teknikoj estas blokataj nervoj sur diversaj niveloj de la nerva sistemo por

## Esperanto aplikata

ZET estas monata gazeto por Tram- kaj Bus-istoj de la Zagreba transport-entrepreno. Dum pli ol kvaronjarcento ĝi enhavas du rubrikojn ligitajn al esperanto. Unu estas *Ŝirom Svjeta* (Ĉirkaŭ la mondo), kiu redonas en la kroata lingvo informojn ricevitajn pere de esperanto. La alia estas *Esperanto*, kiu portas mallongigon de la plej gravaj informoj el la gazetaraj de la pasinta monato en esperanto.



Se vi volas kunlabori pri tiu ĉi praktika uzo de esperanto kiel pontlingvo, (bedaŭrinde sen monkompenso), procedu jene:

Kiam vi vidas interesan informon en via nacilingva ĵurnalo aŭ gazeto pri vojaĝtransporto aŭ trafiko (inkluzive metroo), kopiu ĝin. Mallongigu la plej gravan informon ĝis 20 linioj kaj traduku ĝin esperanten. Sendu la mallongigon kaj la kopion de la originalo al:

Marija Belošević, Sveti duh 130, HRV-41000 Zagreb, Kroatio.

Mi mem sendis informojn preskaŭ ĉiumonate ekde 1966!

Henry D. Palmer, Britio

ebligi operaciojn. El la plurnombro de anesteziataj metodoj la regiona anestezo elstaras pro siaj ekologiaj trajtoj de dekomencaj limigo kaj prevento: ĝi limigas anestezon al la esencaĵoj de sendolorigo per laŭeble malmulte de materialo kaj ĝi dekomence preventas malutilon al la malsanuloj pro la laŭeble plej malmulto kaj malprofundo da intervenoj en la organismon.



Ideala, paradigma modelo en la aplikado de la Internacia Lingvo estus ekzemple instruado de regiona anestezo pere de ĝi. kaj ĝuste tio ĉi okazis ĉijaran marton dum dusemajna kurso en la Akademia Kliniko Kaunas, Litovio. La kurso estis aparte organizita kaj prezentita sub ekologiaj vidpunktoj. Kaj la partopreno de pli ol sesdek fakuloj el tuta Litovio pruvis sian plenan sukceson. Pri la organizado respondicis d-ro Alfred Maruška el Pasvalys, Litovio, kaj pri la instruado en la Internacia Lingvo la Centro pri Ekologia Medicino en Ahnatal, Germanio

D-ro med. W. Gunther

Centro pri Ekologia Medicino (EKOMED)  
Schulstr. 7, D-W-3501 Ahnatal 1, Germanio

## Aranĝoj

### Pilgrimo al Czestochowa

*Raporto pri 6-a Tutmonda Junulara Renkonto kun papo Johano Paŭlo la 2-a*

La 5-an de aŭgusto '91 ekis pilgrimo de Varsovio al Czestohova por ĝustatempe alveni tien la 13-an de aŭgusto al la junulara renkonto.

Partoprenis 387 mil poloj el ĉiuj urboj kaj urbetoj de Pollando (inter kiuj ni 30 sovetianoj el Moskvo, Ivanovo, Krasnojarsk, Smolensk), sed dum la marŝado ŝajnis, ke la tuta popolo iras kun ni, ĉar en ĉiuj vilaĝoj tra kiuj ni iris, la loĝantoj venis renkonti nin kaj akompanis nin anime, okule, kore. Dum la vojo la loĝantoj estis helpataj per akvo, teo kaj kompoto. La vojo estis sufiĉe malfacila 263 km-ojn longa kaj ĉ.30 km po tage sed ĉiuj helpadis unu ja alian, ĉiuj estis gefratoj en unu granda familio. Kaj tradicie oni eĉ devis turni sin al unu la alia per vortoj frato kaj fratino.

La karavano estis dividita je grupoj po kelcent personoj. Ĉiu grupo havis propran pastron gvidantan dum la tuta vojo: ili kantis, gitarludis, legis preĝojn, organizis konferencojn pri spiritalaj temoj dum la tuta marŝado, ili eĉ amuzigis nin. Mi neniam antaŭe pensis, ke pastroj povas esti tiel gajaj, bonhumuraj homoj, similaj al ĉiuj al ni, ke ekzistas multaj gajaj kantoj pri Kristo.

Ni noktumis en kortoj de vilaĝanoj en tendoj, aŭ en dormosakoj en fojnejo sub tegmento. La gastigantoj tute ne timis la pilgrimantojn. Tute prave, ĉar pilgrimantoj estas ĝentilaj kaj nenion faras malpermesitan.

Al la junulara renkonto venis 1,5 milionoj da partoprenantoj el la tuta mondo. Ĉie estis homoj videblaj. Certe por ni la renkonto estis neforgesebla, des pli, ke la Papo salutis ni inter aliaj lingvoj ankaŭ esperanto kaj dum la malfermo, kaj dum la fermo. Dankon al esperantistoj-geamikoj Dorota Malkowska, Zbišek Kowazki kaj multaj aliaj, kiuj estis kun ni dum la tuta vojo.

*Olga Dudašova, Smolensk  
(laŭ Moskva Gazeto julio-aug.1991)*

### Ĉijare denove

okazos pilgrimado al Ĉenstohovo (PL), kun eble pli da esperantistoj ol pasintjare. Ni esperas, ke ĉijare en Pollando sur la vojo de Varsovio al Ĉenstohovo ni ĉiuj renkontiĝos, ĉiuj kiuj serĉas la vojon al Dio kaj por kiuj la ideo de Zamenhof, ideo de komunumo per la lingvo estas valora kaj grava!

*Krzysztof Kliszczinski, ul Regulska 56,  
PL-02-495 Warszawa 122, Pollando*



### Oficiala AntaŭKongreso de UK en Prago

19.07-25.07.1992. Prago, Ĉeĥoslovakio

La kongreson aŭspicias la ĉeĥa ministro pri kulturo kaj UEA. Estas antaŭvidata partopreno de ĉ.300 partoprenantoj (200 en hotelo + 100 en studenthejmo).

#### Skiza programo:

**Turisma:** perbusa urba rondvojaĝo, du duontagaj piedekskursoj tra la urbocentro, tuttagaj busekskursoj al la ĉirkaŭaĵo, dum la libera tago varia elekto de eksterprogramaj (krompageblaj), ekskursoj.

#### Kleriga kaj distra:

– Tuttaga internacia seminario dediĉita al la 400-jariĝo de la "instruisto de nacioj" Komenio, fama pedagogo, humanisto kaj reformisto, konsiderata ankaŭ kiel prapatro de interlingvistiko.

– Vizito de la Nigra (ombra) Teatro.

– eta kolokvo pri la nuntempa Ĉeĥoslovakio,

– vespero de esperanta rokmuzika kulturo,

– amuza interkona kaj adiaŭa vesperoj.

#### Partoprenkondiĉoj:

Por A-landanoj: 1.290 DEM (okcidentaj landoj laŭ la UK-aligilo) en tri-stela hotelo ĉ. 20 minutojn de la historia urbocentro, La kotizo inkluzivas la aliĝkoton, 6 tranoktojn en dulita ĉambro kun ĉiuj manĝoj, ĉiujn ekskursojn per luksaj busoj.

La aliĝilon kaj aliajn informojn petu de kaj pagu al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Por B-landanoj (netranspagipovaj) kaj por sub 26-jaruloj de ĉiuj landoj en studenthejmo estas lokoj en 2-3 litaj ĉambroj, kun duona pensiona manĝo, sen busa ekskurso kaj Nigra Teatro, sed ili ĝuas speciale rabatitajn kotizojn. La partoprenkotizo por esperantistoj el eksGDR, Hungario, Pollando, sudslavaj landoj kaj A-landanoj ĝis 26-jaroj estas nur 190 DEM. La kotizo por partoprenantoj el Bulgario, Rumanio, eks-Sovetiaj ŝtatoj, Azio (escepte de Israelo, Japanio, Korea Resp.), Afriko, Latin-Ameriko estas nur 150 DEM.

B-landanoj aliĝu ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio, AK -'92, Jiřská 10, CS-110 00 Prago 1, Ĉeĥoslovakio.

Oni povas aparte mendi la perbusan vojaĝon al la UK en Vieno, bileton por la Nigra Teatro, aŭ por perbusa rondvojaĝo tra Prago.



*La AK estas memstara de UK aranĝo, tiel ne estas kondiĉo aliĝi al ambaŭ. Estas organizata busvojaĝo al la UK en Vieno.*

Pliajn informojn kaj aliĝilojn petu ĉe ĈEA, resp. ĉe UEA!

### SAT-Kongreso en Litovio!

*La 65-a kongreso de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) okazos inter 05-15. de aŭgusto en Kaŭnas, Litovio.*

*Pliaj detaloj en la sekva numero.*

### Fonto el kiu venas libereco

Tio estis la devizo de la lasta Eŭropa Junulara Renkontiĝo organizata de la ekumena fratara de Taize, inter la 30.12.1991-04.01.1992 en Budapeŝto (H). Alvenis ĉ. 75 mil (!) partoprenantoj el multaj landoj. Tia renkontiĝo okazas ĉiu jarŝanĝe en iu eŭropa urbego. Krome la fratara akceptas homojn ĉe si en Francio dum la tuta somero.

Por la aranĝo en Budapeŝto mi petis esperantistojn, kiuj intencas partopreni ĝin, anoncu sin ĉe mi, por ke ni povu esti ĝin grupon. Fakte kontroviĝis entute ĉ. 25 esperantistoj el 8 landoj (sed neniam ĉiuj estis kune): parte per tiu antaŭa alvoko, parte per afiŝoj en Budapeŝto, parte per la granda esperanta flago kunportita de poloj. Budapeŝtano Sándor PÉTER organizis komunan tranoktejon, sed nur ses poloj kaj mi eksciis pri ĝi sufiĉe frue. Cetere li zorgis ankaŭ pri tio, ke dum matena preĝo en la loka preĝejo ankaŭ esperanto estu uzata, kaj ke la esperantistoj prezentis sin tie je la 2-a de januaro. Bedaŭrinde la lernejo en kiu ni tranoktis estis mal-

proksima de la ĉefaj kunvenejoj. La kutimaj programoj estis: matenmanĝo, matena preĝo, diskuto pri paragrafo el la "Letero el Taize", veturo al la centro, tagmeza preĝo, tagmanĝo, enkonduko en biblia temon kun posta diskuto, vespermanĝo, vespera preĝo. La preĝoj havas meditecan stilon. Oni kantas mallongajn kantojn multfoje ripetatajn; preĝoj estas legataj, estas tempo de silento. La diskuto okazas en malgrandaj grupoj, el kiuj unu nun estis la esperantista. Ĉiam kelkaj esperantistoj el la tranoktejoj sukcesis sufiĉe frue ellitiĝi por partopreni ĉe ni en la matena preĝo kaj diskuto.

La lastan vesperon ni renkontiĝis en la budapeŝta esperanto-klubo Esperejo, kaj tie ni renkontis ankaŭ esperantistojn sen rilato al Taize.

*Reinhard Pflüger, Germanio*

*La partoprenantoj bone fartis, sed kiom da dezirantoj estus, se ĉiuj koncernuloj sciintus pri tiu renkontiĝo? Ĉu en Esperantujo ekzistas nur dudek kvin religiemiaj samideanoj (kiuj havus tempon, monon, ktp), aŭ ne atingis ĉiujn la informo.*

## "Eurofuture"

26.06-08.07.1992, Schwäbisch Hall (Germanio)

Internacia Junulara Tendaro okazos en Schwäbisch Hall (70 km nordoriente de Stuttgart, Germanio) **NE speciale por esperantistoj**, sed ankaŭ tiuj estas bonvenaj. La lokaj programoj, kiel vizito de lernejo kaj entreprenoj okazos en la germana kaj la angla, tial la kompreno de unu el tiuj lingvoj estas bezonata (aŭ oni mem prizorgu tradukiston). Uzi esperanton oni povos inter la esperantistaj partoprenantoj.

Pri detalaj programoj informoj ne estas konataj por la redakcio.

**Partoprenkotizo: SENPAGA**, inkluzivas tendaron, manĝaĵoj kaj programoj.

*Kontaktadreso por esperantistoj: Horst Vogl, Teuerweg 92, D-W-7170 Schwäbisch Hall, Germanio. Tel: +49/791/72328.*

## SEJT apud Sankt-Peterburgo

02.07-12.07.1992.

La historio de Sovetiaj Esperantistaj Junularaj Tendaroj komenciĝis en la jaro 1958. Kvankam intertempe ili ne plu okazas en tendoj, sed en feriejoj, t.n. turismaj bazoj kaj eĉ Sovetio jam ne plu ekzistas, ankaŭ la ĉi somera renkontiĝo konservas sian tradician nomon SEJT. (Eĉ la aĝlimo ne estas strikte "junulara". Eble post jardekoj en kvizoj estos ruza demando kion signifis SEJT origine ĉar "esperantista" ĝi certe restos, kiel SEJT mem restos longe sendube. La red.)

Ĉijare ĝi okazos en feriejo *Tolĉakovskaja* pitoreska apudlaga loko apud Sankt-Peterburgo (iama Leningrado).

Antaŭvideble ĉeestos 200 gejunuloj esperantistoj el eks-Sovetio kaj kelkdeko da eks-terlandanoj (ĉu eks-terlandanoj?).

La etoso estos nure esperanta; oni ne rajtas **krokodili dum SEJT**.

Okazos konkurso pri gajeco kaj spriteco, ridvespero, somera univesitato, SEJM-konferenco, koncertoj de la plej bonaj kantistoj de eks-Sovetio, teatraĵoj, ktp. Kaj certe ĉiunoktaj lignofajroj ĝis mateno.

Ne forgesu pri belega naturo, kaj amikiĝemaj rusiaj, ukrainiaj, kazahaĵaj, kartvelaj, latvaj k.a. junaj gesamidenanoj!

Partoprenkotizo: ĉ. 70 USD (kun plia rabato por ekssoclandanoj), kvankam laŭ iuj informoj tio estas nur *aliĝkotizo*. Demandu!

*Andrej Lyskov, Ab. jaŝĉ.34, SU-117071 Moskvo, Rusio*

## Nacia Kongreso de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko

18.07-22.07.1992, Berkeley, California, Usono

*Organizas: ELNA, Inc. C.O. PO.Box 1129, El Cerrito, Cal 94530, USA*

## Boatado en Litovio

28.05-31.05.1992, Nacia Parko "Aŭkštajtija"

Komuna navigado sur naŭ lagoj kaj riveretoj, kantado, dancado, ludado de "tumbi-jumbi".

*JEK "Juneco" P.K. 61. Vilnius 2000, Litovio*

## Dum la UK tranoktu en ... Hungario.

Ĉirkaŭ sepdek kilometrojn de la kongresejo trans landlimo en urbo Sopron (Hungario) estas organizata studenthejma tranoktejo kun ĉiutaga busvojaĝo per propra buso al la kongresejo.

La partoprenantoj estu nur tiuj, kiuj nek al Aŭstrio, nek al Hungario bezonas vizon pro la ĉiutaga landlimo-trapaso. Ĉiutage reveturo de la kongresejo je la 22.00. Ne ekzistas aĝlimo kaj ne estas postulo aliĝi al la UK.

Partoprenkotizo: 10 mil HUF (ĉ. 1400 ATS) inkluzive la buskoston.

Organizas: s-ino Júlia TÍMÁR, H-1118. Budapest, Ugron Gábor u. 11-17. A/1, Hungario.

## KISO en Marburg,

Kafoklaĉa Internacia Somera Renkontiĝo.

22.06-28.06.1992, Marburg, Germanio

Temo: ludi, krei, sperti sin mem.



En arbara naturamika domo, taŭga por 20-40 personoj (en litoj, matracoj, tendoj), komuna (mem)kuirado. Okazos esperanto-kursoj, tradukado de *Asteriks*-komikso, urborigardo, serĉludo, botanika gvidado en arbaro.

Partoprenkotizo: ĝis 31-a de majo 110 DEM lite, 100 DM propratende aŭ matracede (surloke) + 20 DEM

La aliĝo validas post antaŭpago de almenaŭ 50DEM al Marburga Esperanto Grupo, ĉe Sparkasse Marburg-Biedenhof, konto: 100509350, bank-kodo: 533 500 00 (notu KISO-92)

Organizanto: *Marburga Esperanto-Grupo, Gunter Neue, Kaffweg 9b, DW-3550 Marburg, Germanio, (Tel: +49/6421/27889, nur dum la renkonto: +49/6421/63851).*

"Juna estas tiu, kiu sentas sin tia..."



03-09. en aŭgusto, 1992.

Esztergom, Hungario.

Detalan informon kaj aliĝilon vi trovos en la sekva numero!

## Internacia Esperanto-kurso por gejunuloj

02.08-09.08.1992 Prago (CS)

En mezlerneja studenthejmo proksime al la urbocentro estas planataj kvar diversnivelaĵ lingvokursoj en antaŭtagmezoj po 3 horoj:

- A - por komencantoj (kun germana kaj ĉeĥlingva helpo)
- B - paroliga kurso por progresantoj (kun jama scio de minimume 500 vortoj)
- C - perfekta kurso por jam bone parolantoj
- D - trejnkurso por instruantoj.

Por farti hejmece estas planata la partopreno de 40-50 personoj, en 3-litaj ĉambroj. Posttagmeze kaj vespere amuzaj programoj, ekskursoj.

**Partoprenkotizo:** ĝis 30-a de junio por landoj: A: 210 DEM, B: 140 DEM, C: 110 DEM. Post tiu limdato krompago po 30 DEM, super aĝlimo 30 jaroj ankaŭ krompago de 30 DEM en ĉiuj kategorioj. (Landoj B: Hungario, suds-lavaj landoj, Pollando. Landoj C: Bulgario, Rumanio, ekssovetio, Azio (krom IL, J, RK), Afriko kaj Latin-Ameriko.)

La kotizo inkluzivas tranokton (7 noktoj), 3 mangojn tage, kursojn, buseksurson, enirpagojn, sed ne asekuron. Post la renkontiĝo estos organizata komuna veturo al MEJS, Olomouc (CS) al dezirantoj.

La aliĝilo ekvalidos post antaŭpago, pri la eblecoj demandu la organizantojn:

*Vladimir kaj Pavla Dvorákoví, Zelenecká 20, CS-194 00 Praha 9, Ĉeĥoslovakio*

## 14-a Renkontiĝo de Esperantistaj Familioj

01.08-08.08.1992, Óriszentpéter, Hungario

**Loko:** Gastejo *Kenguru Fogadó* — okcidente de Óriszentpéter al direkto de Szalafő, tre proksime de eta katolika preĝejo, izolite de domoj. Óriszentpéter atingeblas tra Körmend, apud landvojo Graz-Budapest.

Ĉambroj 1-5-litaj. Eblas kuiri mem. Malfrue aliĝantoj povos loĝi en dometoj *Domino*, iom pli koste (+ 30 DEM).

**Programo:** tradicie laŭ la interkonsento de la ĉeestantaro. Aparta servo al la plej junaj infanoj (ludado, kantado, dancado, desegnado, spertaj ludoj), mallongaj ekskursoj en la naturo, vizitado de proksimaj lagoj.

**Partoprenkotizo:** ĝis la 1-a de majo 130 DEM por ĉiuj servoj (loĝado, manĝoj, programoj).

Krokodiloj ne estas invititaj.

**Organizas:** s-ro Ernő CSISZÁR, Kulich u. 25, H-8100, Vórpalota, Hungario. Tel: +36/80/71095 (nur ĝis la 25-a de junio).

## Movado

### Pasporta Servo

Ĉu vi konas Pasportan Servon? Certe jes: vi ja konas la plej faman servon de TEJO, kiu permesas gastigi ĉe esperantistoj dise tra la mondo kontraŭ malmulte da mono, foje eĉ senpage. Vi certe konas la broŝuron, kiu rajtigas vin uzi la Servon, ĉu ne? Bone. Jen alia demando: ĉu vi, iam ajn, legis ĝin? Mi preskaŭ certas, ke ne: eble vi trafolumis ĝin, por trovi konvenan lokon dum viaj vojaĝoj: prave.

Ankaŭ mi tion ne faris, ĝis iu gastiganto montris al mi en la eldono 1991-92 (pasintjara), la pledon de gastigantino en Francio, por ke la servo ne iĝu instigilo al ŝtelado, postulado de mono, kialo por akceptigi sekŝperforton, ktp. Mi ŝokiĝis, kaj decidis legi la broŝuron kiu akompanis milojn da kilometroj de mia vivo. Mi prezentas rezulton de mia legado al tiu ĉi afabla publiko.

Unue, eta prezento de la labormetodo: mi tralegis la tutan broŝuron, notante la — statistike — plej oftajn, plej bizarajn, plej misvojigitajn, plej humurajn, plej strangajn frazojn, kiujn la gastigantoj enmetis en siaj klarignotoj; kiel vi certe scias, gastiganto rajtas limigi sian pretecon malfermi sian pordon al difinitaj homgrupoj, pro kialoj, kiuj povas (kaj rajtas) esti prisanaj, religiaj, sociaj, leĝaj, ktp. Plej ofte la peto estas, ke oni ne fumu en la domo, kiel petas 257 gastigantoj (unu petas nur, ke oni ne fumu en la lito, pro evidentaj sekurecaj kialoj; sed kion pensi pri tiu, kiu deklaras *fumi balkone*? Ĉu tiu stipigas la gastojn surbalkone por amuzi la najbarojn?)

*Fumantoj* estas akceptataj oficiale nur en 2 okazoj, pli ol drinkantoj kaj *concertistoj*, sed malpli ol *virinoj* (12), *fluparolantoj* (9) kaj *edziĝintaj paroj* (5). Ili estas eĉ pli akceptataj ol *deculoj* kaj *honestuloj*, kiu samrangas kun *naĝkapabluloj*, *neusonanoj* kaj *netristuloj*. *Junaj fraŭloj* allogas 4 gastigantojn, dum *veraj esperantistoj* nur 3. Io por pripensi, ĉi tie...

Bonvenataj estas ankaŭ *vegetaranoj* (26) kaj la *nedroguloj* (12), kiuj estas — evidente — pli akcepteblaj ol la drinkuloj, kiujn rifuzas 14 gastigantoj. 26 petas IRK-jn (intermancia respondkuponon), 29 pretas gvidi vin en la ĉirkaŭaĵoj, 20 postulas reciprokajn gastigadon, 5 ŝatas alternativulojn, 19 biciklojn, sed 2 pretas lui aŭton kaj unu eĉ boaton. Normale la antaŭanonco estas postulata iom da semajnoj antaŭe, eĉ en landoj kun invitaj problemoj. Iom mirigas tiu, kiu postulas *plurajn monatojn* de antaŭanonco, aŭ la matematikisto, kiu malfermos sian pordon sur vian nazon se vi ne respektos la 100-tagan datlimon, kiun li starigis por certigi restadon.

Gastiganto ne estas gastmaŝino: tiu estas homo, kun propraj ŝatoj, pri kiuj ŝatas paroli kun vi (aŭ ĉu estas iu, kiu profitas de Pasporta Servo por nur ronki, ĝeni, ŝteli, sekŝperforti, ktp?) Pri kio, do, vi povos paroli, utiligante la mirindan lingvon de Doktoro Esperanto? Statistike, prefere pri *montgrimpado* kaj *muziko*. Ankaŭ pri *lingvoj*, *esperanto-kulturo*, *vojaĝoj*, *religio*, *psikologio*, *dancoj*, *turismo*, *medicino* kaj *ekologio*. Tute bone. Sed vojaĝemuloj povos paroli pri ankaŭ *kajako*, *motorbicikloj*,

*Danlando*, *mineraloj*, *telefonlibroj*, *Universal' Kalendar'* (tiel!) *frisbio*, *skermado*, kaj *radioes-tezo*. *Bibliotradukado* kaj *ŝakludoj* manki ne povis, samkiel *fungokolektado* kaj *migrado*. Mi esperas, ke vi konsentos, ke nur idioto povos enui.

Pri ĉio ĝis nun aludita, mi ĝojas. Pasporta Servo estas vivanta servo al vivanta komunumo, do ĝi ja devas speguli ĉiujn facetojnde nia bunta mondo. Konsentite. Do, ni aĉetis ĝin, iom planetis la vojaĝon, kaj decidis kontakti niajn ontajn dommaŝtrojn. Nur ĉe tiu ĉi momento ni rimarkis, ke kelkaj el ili mesaĝas al ni iom ... kiel diri ... strange. Ni klopedu sekvi iel logikan ordon: unue, oni decidis la landon, due la urbon, trie la gastigantojn. En ordo.

## PASPORTA SERVO



La landon, unue, do. Iu informas nin, ke en sia lando estas tre vivindaj aĵoj kaj tre afablaj loĝantoj: kial ne viziti ilin? Vi povas esti en *bicikla regiono* (mi konfesu, ke mi neniam vidis regionon kiu estus aŭta, raketa aŭ trajna...) kaj estante biciklanto, vi trovos duŝeblecon, kiel informas alia gastiganto: se vi volas lavi vin, ne iru aŭte, Gastigantoj atendas vin: en unu kazo akompanas vin la ratkaptisto de Hameln: por kion fari kun vi, mi ne scias. Iu ofertas al vi *midan* loĝadon, kion ajn tio signifas; ion afablan, certe, samkiel ĉi tiu, kiu *garantias* agrablan restadon. gartulojn. Tamen vojaĝu, homoj.

Aliloke oni certigas banadon en mineralakvo, viziton al varmakva fonto, observadon de naturo (de kie, ne demandu). Nur kondiĉe, ke vi sukcesis klarigi ĉinlingve, ke vi petas iun difinitan telefonnumeron al la telefonistino de la universitato, evidente. Tamen, jen vi en la lando. trovi la lokon ne estos problemo: foje trajnoj eĉ haltas antaŭ la dompordo (ĉu vi kredis, ke nia movado estas tiom pova?); kaj eble je la kvina etaĝo sen lifto, jen via nova pormomenta hejmo.

Kelkaj havas katon, kelkaj hundon, kiun bonvolu ne timigi (mi iom dubas pri la ekzakta signifo de *hundo* kiu *ŝatas* homojn, ekde kiam *dobermann* klopodis vespermanĝi je mia dekstra brako). Eble vi ne trovos vian gastiganton, ĉar tiu loĝas en hotelo (eble por lasi al vi pli da loko), aŭ eble vi loĝos en hotelo, kiu havante esperantistan kelneron, kaŝe enŝovos vin. Senpage. Tamen, jen via dommaŝtr(in)o. Se vi ne devis skribe prezenti vin al *katolika pastrejo*, povas esti, ke vi devos persone prezenti vin kaj klarigi vian vojaĝcelon, aŭ eble vi devos montri vian atestilon pri aidoso kaj registri vin ĉe loka policoje. Vi senŝuigos, vi montros, ke vi estas neviro, ke vi estas *malfumanto* kaj *malfikutimulo* (kiel ajn oni disvastigus tiun ĉi vorton...), aŭ — kial ne? — ke vi estas (samtempe) *hipio*, *krudvortulo*, *sovaĝulo* kaj *primitivulo*, eble *franco*, *havanta monon*,

eble *bonmaniera* (sed la slipo ne klarigas ĉu vi aŭ via gasto devas esti tiaj), kaj *sen alkoholo*.

Bonvolu, ĉiukaze, *ne kunporti kokainon*, aŭ *vi estos pafata*. Eble helpu vigligi grupon, iom helpu en la domo, kaj — kiel rifuzi — *la privatan industrion* de la gastiganto, kiu, kompatinda, loĝas en *detruita domo*, kaj povas proponi al vi nur *gean litosofon*. Atentu, tamen, ĉar *limanĝas vivantan manĝon*, ne nepre vin. Ne ludi mekanikajn muzikinstrumentojn, tio ĝenos la infanojn, kun kiuj vi estas petata *ludi duhore tage*. Fifriponoj bonvolu ne misinterpreti la invitojn venigi *ankaŭ fraŭlinojn*, por ke *ankaŭ la fratino povu profiti*, kaj tiun celanta homojn, kiuj kapablas kaj volas ludi kun mia filino. Dankon.

Jen, iom alimeniera *Pasporta Servo*, ĉu ne? Legu ĝin. Viaj ferioj estis aliaj, venontfoje.

Ĉu vi ne kredas min? Kontrolu, bonvolu. La *kursivaj partoj* estas aŭtentikaj perloj el la eldono 1991-92. Trovu la aliajn.

Norberto SALETTI, *Italia*

(laŭ "La Kancerkliniko", n-ro 61, la politika, kultura, skandalema, ajnista esperanto-revuo)

Leginte la supran artikolon vi povas konvinkiĝi kiom variaj eblecoj estas pere de Pasporta Servo krom la nura tranoktado. La reciproka interesiĝo al la alia homo estas natura eco de ĉiuj esperantistoj, sed devigi ne eblas (eĉ ne indas) tion. (Imagu: vi devas esti afabla al mi!)

Tial ne estas bonŝance, ke la eldona agado de tiucela adresaro diseriĝas pro la apero de *Amikeca Reto*, eldonata de SAT. Por komencantoj: *Amikeca Reto* ne celas tranoktigon de la gasto, nur kontakton de vojaĝanto, montri ekzemple sian laborejon, babili en kafejo. La du aferoj ne estas tiom fremdaj, mi dirus, eĉ ili estas ĝemelaj tiam, ke ofte miksigaŝas la du funkcioj de amikiĝo kaj tranoktigo.


Malpermesi al iu (feliĉe) ne eblas eldoni ion ajn. Mi bedaŭrinde pli vidas en la afero senton de apartismo, ke "ni volas havi ion propran, ni ne miksigaŝas kun ilia Pasporta Servo".

Certe estus pli ekonomie eldoni ambaŭ en komuna adresaro, malpliigante organizajn kos-tojn, preskostojn kaj havunte pli dikan, sekve pli utilan adresaron.

ŝH

## La KANCERKLINIKO

—n° 61— 23 FF. o jan/feb/marto 1992 o



## Anoncetoj

Buso da geamikoj serĉas neluksajn tranok-tejojn (gimnasikejo, tendumejo) kaj kontaktojn kun lokaj esperantistoj fine de julio laŭ la sekva itiniero: Vaduz, Bern, Genf, Nevers, Tours, Parizo, Bruselo, Antverpeno, Amsterdamo, Bonn, Stutgarto, Munkeno. Ni estas ĉ. 40 hungaroj, kelkaj esperantistoj kun siaj geamikoj.

*s-ino Szilvia HORVÁTH,  
Kosztolányi tér 7. I/6.  
H-1114 Budapest, Hungario*

Juan LICERANZU deziras aĉeti uzitajn poŝtmarkojn el Ĉeĥoslovakio, aŭ se eblas, volonte interŝanĝus ilin. Skribu al:

*Juan LICERANZU,  
A.V.D. Gabriel Aresti - 12 - 6° B,  
48004 Bilbao, Hispanio.*

Internacian infanan someran tendaron organizas la Esperanto-Junularo de Brandenburgio inter 27.06.-14.07.1992. La aĝo de la infanoj estos inter 8 kaj 14 jaraj. La antaŭvidita programo estas vere varia kaj bunta. La partoprenkotizo estas 390 DEM, kaj oni planas inviti ĉ. 50 infanojn senpage el la ekssocialismaj landoj. Petu pliajn detalojn ĉe:

*Esperanto-Junularo Brandenburgio,  
Domo de la Junularo,  
Berliner Str. 49, DO-1560 Potsdam, Germanio*

Esperanto-Societo FLAMO kolektas materialojn pri esperantologio kaj ĉiujn specifajn, valorajn sciigojn pri la esperanto-movado en la mondo, kaj volonte kontaktos ĉiujn, kiuj ankaŭ interesiĝas pri la supre menciitaj temoj. Skribu al:

*Josef Waliszewski,  
skrytka 16, PL-87100 Torun, Polio.*

**La Kancerkliniko (LKK)**, politika, kultura, skandalema, ajnista gazeto. Eldonas Ĵak Le Puil, "Les Cocherats", F-18210 Thaumiers. Aperas 4-foje jare, formato A-4, 28 paĝoj, plus la eventualaj kromnumeroj. Kotizperantoj en 18 landoj. Baza abonkotizo 115 FF. Petu pliajn detalojn, kaj provekzempleron (kun IRK) de la eldonanto.

### Ĝustigo

En nia pasinta numero sur la p. 4. la artikolo "Kial instrui esperanton" ne havis la nomon de aŭtoro, Claude Piron.

EVENTOJ, esperantó nyelvű információs lap.  
Nyt, sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.

A kiadó és a szerkesztőség címe:  
1675 Budapest, pf. 87. Tel: 1288258.

Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELIR.  
Készült az M & M nyomdában.

H-1161 Budapest, Becsényi u. 10.

EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.  
Eldonas Kultura Esperanto-Asocio  
kaj LINGVO-Studio, Budapest.

Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.  
Teknike redaktas Sándor Hideg.

La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.



Sendinto:  
*La leganto*

*Eventoj  
H-1675 Budapest  
Pf. 87.  
Hungario*

Ni esperas, ke via starto estos pli bonŝanca ol tiuj, kiujn vi mencias en La Unuaj Vortoj. Almenaŭ tion ni deziras al vi, ĉar tiaspeca gazeto, sed regule aperanta, estas ege necesa por ni aktivuloj, sed ne nur, ĝi ankaŭ povas esti bona instru-materialo por kursoj.

La tekstoj estas mallongaj, peras interesajn informojn kaj aktualajn novaĵojn. Lingvo-uzo estas normala, sen ne-necesaj neologismoj. Temoj taŭgaj kaj por komencantoj, kaj por progresantoj, do fariĝu ideala gazeto por ĉiuj. **Alia demando: Ĉu ni bezonas pli da literaturaj revuoj?**

Ĝus aperis nova eldono de Norda Prismo. Iam ĝi estis unu-nura(?) (mi ne certas). Poste en la jaro 1981 en Literatura Foiro n-ro 89 (nenie mi trovis informon ekde kiam ĝi aperas) estas skribite "oficiala organo de Norda Prismo". Estas ĝenerale konata afero, ke niaj esperanto-revuoj baraktas kun manko de abonantoj. Ni jam havas bone funkciantan Literaturan Foiro kaj nun ... nova lit. revuo, ĉu vere necesus?

Estus pli praktike pligrandigi LF kaj ĝiajn abonantojn. Mi ŝatus legi la opiniojn de la redaktoro de Norda Prismo.

*Mila k. Gerardo van der Horst (Nederlando)*

... La projekto de nova dusemajna periodaĵo ŝajnas tro ambicia, kaj teknike kaj merkate...

*Giorgio Silfer (Italio)*

Sukceson al Eventoj! Esperanto en laborejoj estas inda iniciato, sed laŭ mi, estu antaŭvidata aparta eldonado de tia adresaro kiel ekzemple Pasporta Servo.

*Germain PIRLOT (Belgio)*

... mi ricevis la n-ro 2, kiu fakte estas pli riĉa ol la 1-a. Sed ĉu tia revuo havas sian lokon apud Heroldo?

*Ĵak Le Puil (Francio)*

Plaĉis al mi la informa artikoleto "Unua Ĉeĥa Studsesio de AIS daŭrigos la Comenius-konferencon '92". Laŭ ĝi, mi unuafoje eksciis pri tiuj aferoj, kiuj laŭ mi havas gravegan signifon por la esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio. Kiel bohemiisto mi ricevas aerpoŝte el Prago ok gazetojn, tamen ĝis nun mi neniam vidis en ili mension de esperanto.

Unu rimarkigo: Pro necerteco mi konsultis UEA-Jarlibron kaj konstatis, ke AIS estas mallongigo de Akademio Internacia de Sciencoj San Marino, sed SUS restas al mi nekomprenebla. Necesus aldoni plenan liston de mallongigoj.

*KURISU Kei (Japanujo)*

Kiam mi ekvidis n-ro 0001 de Eventoj, mia tuja reago estis ne eboni ĝin, ĉar mi jam

ricevas tro multe da esperanto-legaĵoj. Sed rapide trafolumante ĝin, mi rimarkis, ke estus vere stulte ignori ĝin, ĉar la kosto estas tre malalta, kaj ĝi ŝtopas ĝisnunan mankon en la movado.

### New-logismojn for!

Mi havas unu kritiketon: mi esperas, ke vi zorge konsideros neologismojn antaŭ ol uzi ilin en — kio verŝajne fariĝos — tre internacia kaj populara gazeto. Mi ne kontraŭstaras neologismojn, mi uzas ilin mem, kaj kredas, ke ili estas parto de vivanta lingvo. Sed vere oni ne estas devigita elpensi novan vorton por ideo, kiam oni jam povas bone esprimi ĝin. La vorto "marketing" tute ne plaĉis al mi. La angla vorto "to market" havas almenaŭ sep signifojn: aĉeti, butikumi, esplori merkaton, komerci, reklami, vendi kaj vendigi; se ni konsideras la substantivon "market", la listo denove kreskas.

Mia konsilo estas: ne kuraĝigu al verkistoj aŭtomate elekti anglan vorton por neologismo nur ĉar tio estas internacie moda. Mi tute ne volas vidi esperanton kun tiaj vortoj: "disapointigita, parkingejo, hangglajdingisto..."

*Seán OSBORNE (Nederlando)*

...La ĵurnalo plaĉas. Interesa, bona, bela. Sed neagrablajn aĵojn mi trovas en ĝi: erarojn. Mi tre bedaŭras tion, sed multo da eraroj troveblas en Eventoj, precipe prestehnikaj misaĵoj...

*Láng Attila D. (Hungario)*

Gratulojn pro Eventoj. Mi tre ŝatas vian raŭmismon (inkluzive de la dikigo!). Ĉu mi rajtas atendi, ke vi listigos esperanto-aranĝojn tra la tuta mondo? Mi scias, ke aliaj gazetoj faras kalendaron, sed ni bezonas eĉ pli kompletan aktualan liston.

*Max WEARING (Aŭstralio)*


... tre scieme mi estas traleginta vian "EVENTOJ"-n, kiu escepte de la t.n. UEA-rugbeopilkeca surogato prezentas agrablan aspekton kaj interesan enhavon...

*Hernandez Llusera (Katalunio)*

## SEF KONGRESO de Esperanto



**22-24  
majo  
1992**



**Oskarshamn**

## Mallonge

**Eŭropa debato:** Belga televido RTBF 1. Elsendo "Objectif Europe" de Serge Flamé sabaton, la 14-an de marto okazis prezento pri esperanto kaj la lingva problemo en Eŭropo. La debaton partoprenis Marc Demonty, prezidinto de Belga Esperanto Federacio, lingvo-instruisto kaj du aliaj lingvo-instruistoj, tradukistoj.

\*\*\*\*\*

**Mallonge,** la malgranda informilo naskiĝis en Nordfrancia urbeto Croix. Ĝia celo estas rapide informi interesulojn pri esperanto-aktualaĵoj. "Mallonge", Esperanto-servo, Lucien Giloteaux, 3/6 allée Béranger, F-59170 Croix, Francio.

\*\*\*\*\*

**Bazaro,** petu provekzempleron de la redakcio: Natalia Fjodorova, SU-335057 Sevastopol-57, P.k. 168, Rusio. Prezo 7 (??) SUR.

\*\*\*\*\*

**Aerobalono:** Ĉu vi volus ekvidi surĉiele egan, belan aero-balonon kun ega surskribo "esperanto" sur ĝia tavolo-kovrilo... kiu dum ekz. Universala Kongreso majeste flugas enaere... ĉu ne imponas la vidaĵo? Se ĉi ideo plaĉas al vi, skribu senprokraste al: s-ro Marian ZDANOWSKI, Pana Tadeusza 15/69, PL-10-461 Olsztyn, Pollando.

\*\*\*\*\*

**Kontraŭe al la antaŭaj informoj LKK de IJK en Montrealo NE organizas flug-karavanon de Eŭropo al Kanado!**

*laŭ la Dua Informilo de IJK-92.*

\*\*\*\*\*

**Amerika Gastiga Servo** nun estas prilaborata! Ĝi estos listo de tiuj Nord-Amerikanoj, kiuj pretas gastigi junajn vojaĝantojn dum la somero de 1992. Ĝi estos iu provizora suplemento al la Pasporta Servo de TEJO, la gastigantoj de P.S. ne aperos en la Amerika Gastiga Servo. Dum la IJK kompreneble ne funkcios la gastiga servo, ja ĉiuj iros al la kongreso! Dezirantoj havi la liston petu ĝin - kun 1 respondokupono - de:

*LKK de 48-a IJK,  
6358-A, rue de Bordeaux, Montreal,  
Kanado, H2G 2R8.*

Al la **Eŭropa Kongreso de Esperanto** en Verona, Italio (5-9. de junio) aliĝis pli ol 300 esperantistoj. Pro la limigita kvanto de ĉambroj (3-4 litaj por 55 m ITL popersone kaj tage kun manĝoj) oni donos prioritaton al la aliĝoj laŭ la dato de la alveno de la aliĝiloj. Krom manpleno de landaj asocioj kaj la Eŭropa Esperanto Unio la kongreson partoprenos ankaŭ pluraj fakaj esperanto-asocioj. Interesiĝantoj bv. kontakti

*Michaela Lipari,  
v. le Giulio Cesare 223, I-00192 Roma, Italio*

## Geedziĝo de esperantistoj

Dietrich Michael Weidmann, internacie konata iama TEJO-aktivulo kaj Nelida Gonzalez-Fouseca geedziĝis la 16-an de aprilo en la svisa urbeto Stein. Korajn gratulojn, kaj multajn feliĉojn!



## Videoserion por lingvokursoj

Ĉu la esperanto-movado kapablas produkti vidbendserion kun kurso por komencantoj uzeblan internaciskale?

Tiun demandon starigas aktiva grupo de esperanto-instruistoj.

Jen la du proponoj:

1. produkti vidbend-serion (filmon) de 24 lecionoj po 20 minutoj por uzo de televidstacioj surbaze de instrumaterialo *Kurso de Esperanto* de fratoj Sekelj. **Kosto: 80 mil USD.**

2. produkti 3-horan vid-bendon kun 12 lecionoj po 15 minutoj por uzo de memlernantoj surbaze de lernolibro *Esperanto 1* de Szerdahelyi aŭ iu alia instrumaterialo, sed kun temoj internacie uzeblaj. **Kosto: 80 mil USD.**

Ambaŭ serioj estos nur en esperanto, do necesos havi poste nacilingvajn tradukojn. Tiujn tradukojn preparos landaj sekcioj de ILEI. La produktado okazus en Pollando sub gvido de Roman Dobrzynsky, profesia filmis-

## Korespondi deziras

Miaj 18 gelernantoj estas 14-17 jaraj-gimnazianoj. Ili tre volonte korespondus Esperante, ĉefe el la okcident-eŭropaj aŭ ekster-eŭropaj landoj. Ni nepre respondos al ĉiu letero. Viajn leterojn atendas ankaŭ la 38-jara instruistino: Vera Rajczyné-Nagy, Alsóögödi u. 16, H-2120 Dunakeszi, Hungario.

John Vella-Bondin, 4 Emmanuel Allard Street, St. Venera, Malta, dez. korespondi pri turismo.

Tasura Vula, Vladadon 5, Gr. 546 34 Thesaloniki, Grekio, dez. korespondi kun viroj 35-60 jaraj.

Jaume Pous, Apartat 24292, E-08080 Barcelona, Hispanio dez. kor. tutmonde pri kulturo kaj amikeco.

Liga Daudzvarde, Daugaopils 38-1, Furmala 11, Latvio, 16-jara fraŭlino dez. kor. kun diversaj landoj.

Ivana Sieberova, U Okresniho uradu 669, CS-33901 Klatovy, Ĉeĥoslovakio, 30-jara, volas korespondi pri naturo, folkloro, manlaboroj.

Magdalena Buczek, Jaworzynska 104/7, PL-59-220 Legnica, Polio, 17-jara, dez. kor. pri reciproka gastigado.

to kaj ĵurnalisto, kunlabore kun du instancoj kiuj okupiĝas pri lingvo-instruado, ILEI kaj Internacia Esperanto-Instituto en Hago.

Kelkpersona grupo okupiĝas pri tiuj proponoj jam ekde Havano UK, sed ĝis nun la reagoj ne estas kontentigaj, kvankam financa helpo de du personoj (kiuj tre bone komprenas la gravecon de tia instrumaterialo) en kvanto de dumil USD jam estas anoncita.

Nia demando estas, ĉu la Esperanto-movado pretus oferi monon por iuj el tiuj celoj? Se jes, bonvolu anonci sin al la adreso de

*Internacia Esperanto-Instituto  
Riouwstraat 172,*

*NL-2585 Den Haag, HW, Nederlando,* aldonante kiom da mono vi pretas oferi kaj por kiu propono (1-a aŭ 2-a). Tiuj personoj ricevos sciigon al kiu konto pagi. La reagojn atendas kunlabora grupo kun provizora sekretariino.

*Mila v.d. Horst-Kolinska (Nederlando)*

## Esperanto kaj humanismo

De la 26a ĝis la 30a de julio 1992. okazos en Amsterdam (Nederlando) la Internacia Humanisma Kongreso, organizita de IHIEU, la Internacia Humanisma kaj Etika Unio.

La temo estos: "Humanismo por kapo kaj koro". Kiuj esperantistoj intencas partopreni ĝin? Ili bonvolu kontakti min, por ke dum tiu kongreso kuniĝu kaj ne dronu en la tiea angla-lingveco.

*K. Ruig, P.k. 31069, NL-6503 CB Nijmegen,  
Nederlando.*

*Tel: +31-80-580320, fakso: +31-80-790506.*

**Se vi pretas uzi esperanton en via laborejo, sendu viajn datumojn (nomo, adreso, profesio, fako, eble ankaŭ nomon kaj adreson de la laborejo, posteno ktp.) por publikigi ĝin en la rubriko "Esperanto en la laborejoj"!**

**Atentu!**